

AMIKUMU: FINFINE EBLOS TROVI ESPERANTISTOJN

EAB ĝojas subteni finance la starigon de nova aplikaĵo, kiu ebligas al uzantoj trovi Esperantistojn en la ĉirkaŭaĵo.

La kutima kialo, ke homoj eklernintaj Esperanton forlasas ĝin estas, ke "mi ne trovis iun alian, kiu parolas la lingvon". Aperos en 2017 solvo al tiu centjara problemo.

Amikumu estos senpaga "apo" por saĝtelefonoj, kiu ebligas al uzantoj indiki, ke ili lernas aŭ parolas Esperanton. Amikumu montros al la uzantoj aliajn lokulojn, kiuj indikas, ke ili estas Esperantistoj kaj kiuj konsentas esti videblaj tiel. Ne plu oni devas sin demandi "Ĉu estas aliaj Esperantistoj en mia urbo?", ĉar jam oni povus kontroli mem kaj aranĝi kunveni. Same en novaj urboj aŭ eĉ landoj.

La iniciatintoj eldonos la apon en Esperanto komence, ĉar ĝuste Esperantistoj plej urĝe bezonas ĝin. Sed ili celas helpi al lernantoj de ĉiuj el la 7.000+ lingvoj ĉie ajn en la mondo, inkluzive de 100+ signolingvoj, post kiam Amikumu estos jam eldoninta en Esperanto.

AMASFINANCADO

Programado de tia aplikaĵo estas laborpeza tasko kaj do la skipo malantaŭ la projekto devis ricevi financajn kontribuojn, kiujn ili petas ĉe la amasfinancada retejo Kickstarter. Minimume ili celis atingi 8.500€ ene de 30 tagoj por decidi ĉu komenci la programadon.

Kun granda plezuro la organizantoj de la venonta Kunkongreso de la Esperanto-Asocioj de Britio kaj Skotlando anoncas la nomon de la ĉefpreleganto.

Viktoro Solé estas kataluno, kiu instruas muzikon en la Conservatori del Liceu en Barcelono. Dum pluraj jaroj li instruas Esperanton kaj ekde 2011 li publikigas artikolojn sub la rubriko *La blaga blogo* en la revuo *Kontakto*.

En Edinburgo li prezentos du prelegojn dum la kongreso. La unua titoliĝas *Kial mi ne ŝatas la muzikon de La Espero*, en kiu li, kun la orelo de fakulo pri muziko, klarigos sian opinion, ke ĝi ne taŭgas kiel himno por la Esperanto-movado.

En la dua prelego, *Mansignado por Esperanto*, li proponos tre simplajn mansignojn kiel helpilon por la lernado de Esperanto, similajn al helpiloj, kiujn muzikistoj sisteme uzas en la lernado-instruado de muziko.

Du el la organizantoj propraokule spertis unu el tiuj prelegoj kaj plene atestas pri ĝia ĝuindeco. Ni intence atendis dum pluraj monatoj, ke Viktoro ricevu forpermeson de la


Tiu celo forvaporigis en nur 27 horoj, kiam donaco de EAB forpuŝis la rikolton trans tiun decidigan limon. Fariĝinte sponsoro EAB ankaŭ helpis malhelpi iom da embaraso por la Esperanto-movado, kiam la postan tagon la Ido-fondaĵo faris kontribuon, kiu superis ĉiun alian krom la nia. UEA ĝis tiam ne montris intereson kaj do sen EAB, en la sponsor-listo oni vidus pinte la nomon de *Ido*, kvankam kreas la apon Esperantistoj por solvi eternan problemon, kiu alfrontas Esperanton.

Nu jes, la Ido-skismo apartenas al la fora historio, sed kion diri, se eta Ido (ĉirkaŭ dek homoj ĉe ĝia lasta internacia kongreso) estus la plej

granda subtenanto de tiu unuafaze por-Esperanta agado, dum la oficiala Esperanto-movado malĉeestus? Do, gratulon al ni!


Povas esti, ke tiu alveno de Ido fakte kuraĝigis UEA, kiu pli frue ne montris intereson, ĉar unu semajnon poste aperis UEA en rolo de ĉefspensoro. Finfine!

Se ankaŭ vi deziras subteni la projekton, vizitu amikumu.com/ks, kie vi povus legi pri kion rehavigus al vi viaj donacoj. La kampajno daŭros ĝis la 16a de novembro. Pri Amikumu mem, kio ĝi estas kaj kial ĝi subtenindas, belan videon metis en YouTube Emilio Cid de UEA: espinfo.org/amikumu-cid.



amikumu Find and contact people nearby who speak a specific language

laborejo, anstataŭ inviti iun alian, ĉar ni tre bone scias kiel bone estas lia prezento-stilo. Venu al Edinburgo kaj vidu mem!



Kompreneble la kunkongreso ofertas pliajn prezentojn, kiel ankaŭ la la-

statempe tradician bonfaran kvizon en la malferma vespero kaj komedian kvizon.

Vespere post la fermiĝo oni kunvenos por **grupa manĝo** en loka restoracio. Kaj la lundon oni faros **ekskursion** per la nove refarita fervojo Borders al **Tweedbank**, kaj poste **vizitos la apudan Abbotsford**, hejmon de Sir Walter Scott.

La kunkongreso okazos **de vendredo la 19a de majo ĝis dimanĉo la 21a ĉe The Melting Pot** (5 Rose Street, Edinburgh, EH2 2PR—themeltingpotedinburgh.org.uk), troviĝanta nur 2-minutojn piede for de Princes Street kaj 5-minutojn for de stacidomo Waverley, en la koro de Edinburgo.

La baza kotizo estas £48, kun pluslunĉa versio kontraŭ £60. Transmaraj vizitantoj rajtos partopreni senpage, kaj jama partopreno en aŭ *Lernu* aŭ *Lernu Plu* en la antaŭaj 12 monatoj rajtigos al £10-a rabato.

Mendu vian lokon ĉe britakongreso.org aŭ per telefonvoko al la oficejo. Kaj kontroli en la reto por pli da eventualaj informoj.



In this part of Update I typically try to be upbeat, conveying enthusiasm and looking forward to the coming months. The challenge this time around is that things are different, because many of us have lost a friend in between issues. But Paul was a fan of drama, and so I think it fitting to attempt to exemplify the adage from the theatre about the importance of keeping the show going.

I could spend the whole of Update trying to summarise the contributions made by Paul Gubbins in the 32 years of his life that he was an Esperantist. Few have matched his prodigious output and time commitments. But I think it more important to reflect on the human being, the man behind the performer, for a performer he was, perfectly happy in front of an audience, whether that be the local children (and putting on his puppet shows), his "patients" at university, or even around the table with friends and colleagues from the Esperanto community.

But he was multidimensional, and behind the fun-loving, eccentric persona stood a kind, thoughtful man, a man given to consideration and compassion, to friendly gestures and kind words. A man who thought nothing of travelling 100 miles to visit elderly Esperantists who he couldn't even guarantee would remember him.

Excerpts from our private emails in 2012 show what I'm trying to convey. We were speaking about one of Paul's friend's failing memory in old age, and I brought



up our colleague David Kelso, who, as most of you will know, disappeared in the mountains of Calabria, Italy in November 2010:

I think I'd rather have a good couple of decades in retirement even with declining abilities than have the end that poor David met, who didn't have the opportunity to grow frail. Poor guy.

I know it's strange to say considering that none of us is family and we're effectively all people who share an acquaintance and respect rather than that typical lifelong friendship and sharing of private moments, but I miss him very much and feel cheated

on his behalf that he never had the future that he should have had.

Paul's response is a lovely insight into his humanity and what Esperanto offered to him:

We miss David, of course, not only for his abilities, common sense and hard work but also because he was family. I feel much closer to many esperantists and regard them as (extended) family than I do to many - most - to whom I am related.

I feel in a lot of instances that Esperanto is much more than simply sharing an acquaintance. In some instances, yes ... in others it's a whole lot

more.

That's not to say that Paul didn't have immeasurable love for his own family, of course, some even prior to their birth. I

wrote in his obituary of his distractedness during the weekend when *Sausage* (known to everybody else as Edward) was due to make his appearance. What I couldn't share in it is the email I received the next day, a far removal from the usual lengthy, carefully structured sentences loaded with sub-clauses and commas. The excitement and enthusiasm were palpable:

Just granddaded ... half an hour ago. Just think ... it all began (slowly) yesterday during our meeting. Big trapper ... no weight yet. Still in birthing pool. Don't ask. Whoopee!

Paul was the happiest man in the world that day, the promotion to *Gramps* the best news he'd had since bestowing that title on his own father over three decades before.

And unfortunately he's now gone, far too soon, the message I wrote to him about feeling cheated on behalf of David Kelso now ironically applying to him too. We shall certainly miss him long into the future.

I can't say I've enjoyed writing these words—his death is still too fresh, too recent. But I'm glad to have, at least, had an opportunity to present something of Paul as he was in private, the man behind the performer, the jolly one with the beard.

Tim Owen

EVENTOJ KAJ ARANĜOJ

Okazos dum la venontaj kelkaj monatoj pluraj lokaj kaj regionaj eventoj en Britio.

La plej aktivaj grupoj (Kardifo, Liverpolo, la Nord-Okcidenta Federacio, la Londona Klubo) kiel kutime invitas homojn al siaj aranĝoj. La plena listo videblas ĉe espinfo.org/local-events.

Ni ricevis informojn de Sam Horlock, ke li starigas novan klubon en Southampton, ĉe Olaf's Tun Craft Ale Bar, 8 Portsmouth Road. Li celas kunveni ĉiun unuan dimanĉon je 13:00 kaj aparte bonvenigas novulojn. Kontaktu samuel.horlock@gmail.com por pli da informoj.

John Gbourne sciigas, ke li aranĝis kunvenon en Birmingham por la germana kristnaska bazaro, la 18an de novembro je la 7a vespere en Victoria Square, apud la ŝtuparo de la konsilantejo. Detaloj ĉe john.gbourne@gmail.com.

NOVAĴOJ

Antaŭ 18 monatoj aperis kurso pri Esperanto por anglalingvanoj ĉe la bone konata ĉereta lernilo Duolingo.

Hodiaŭ 580.000 homoj komencis uzi la kurson. Pli ol duon-miliono! (Flanke: Tiel Ed Robertson, kiu faris 19% de la tuta laboro laŭ la oficiala kalkulo de Duolingo, fariĝis la plej sukcesa Esperanto-instruisto en la historio de tiu insularo!)

Post la sukceso de tiu kurso por anglalingvanoj, Duolingo konsentis komenci laboron por versio por hispanlingvanoj. La laboro komencis antaŭ pluraj monatoj kaj en la lastaj tagoj ĝi lanĉiĝis beta-versie (tiel estas, sendube kun eraroj, sed kun peto ke uzantoj indiku ilin por posta korektado, antaŭ la oficiala lanĉo).


Nu, se vi sukcesas legi tion, vi ne bezonas la kurson, sed porinforme, ĝi troviĝas ĉe espinfo.org/duolingo-eo-es.

Want to avoid socks and ties this Christmas? EAB could be the one to help you!

There's something for everyone in our bookshop, from the usual learning materials to translations (*The Lord of the Rings*, *The Hobbit*, *Pinocchio*, *Winnie the Pooh*), original fiction, works about the Esperanto movement ... We'll be offering Paul Gubbins's *Star in a Night Sky* at a heavily discounted price too, as a tribute.

So ask your friends and family to telephone or email us, and we'll try to make sure you end up with something you actually want!


Postage is 20% of the total, with a minimum of £1.50. We have much more in stock than we can show, so get in touch for specific requests.



NEW MEMBERS Dean Wild (Sittingbourne), Miss A E Shaw (Richmond-upon-Thames), Mr J M Harland (Budleigh Salterton), Luke Burgoyne (Willenhall), Stephanie Arteaga (Sandbach), Elisia Green (Knypersley), Brian Bailey (Mottram), Daire Holden, (Wragby), Carlos Pereiradafonte (Dunstable), Antonia Pinto (Brazil), Steven Medgyesy (Derby), John Parkinson (Shrewsbury), Eddy Hunt (Tonypany), David Ash (Lincoln), Roger Moore (Chester), Owen Platt (Sheffield) **DECEASED MEMBERS** Paul Gubbins (Congleton), Conrad Beaumont (Hessle), Arthur Oliver (Australia), Diana Richardson (Glasgow) **COMPLETED THE FREE TASTER COURSE** Peter Cookson (Bury), Dave Sumpter (Disley), Mike Pritchard (Haverfordwest), Tom Hopkins (Blackpool) **EXAM CONGRATULATIONS** Christopher Lewis (Hertford: intermediate exam—distinction), Adam Hall (Cheadle Hulme: elementary exam—merit), Roger Newby (Dinnington: elementary exam—distinction)



£6.40




£11.90




£9




£16




£13




£13



£12



£65




£10.50



£7.80



£12



£18.50




£15.30

Por ĉiu eldono de Update **Jack Warren** preparas krucenigmon bazitan sur iu aparta temo. Jack celas, ke vi amuziĝu kaj eble lernu kelkajn novajn vortojn aŭ eĉ rememoru pri kelkaj iam forgesitaj. Vi povos kontroli viajn respondojn en la venonta eldono de Update.

KRUCENIGMO: INSEKTOJ

Grava informo: Ĉiu vorto estas substantivo kaj konsistas nur el la radiko, sen la o-finaĵo. Do se la respondo al la helpilo estas *esperanto*, aperos en la enigmo la vortformo *esperant*.



Respondoj al la antaŭa krucenigmo
 Horizontale: 2 anas, 4 turd, 6 peg, 7 mev, 9 meleagr, 12 fazan, 14 motacil, 16 agl, 17 merl, 18 koturn, 19 hirund
 Vertikale: 1 paru, 3 cign, 5 rubekol, 6 pig, 8 vanel, 10 paser, 11 anser, 13 falk, 15 cikoni

HORIZONTALALE

4 - verda pesto, 7 - aspektas kiel piulino, 8 - abundas kaj voras, 9 - hejmo por idoj, 14 - mankas al homo, 16 - granda speco de nigraflavulo, 17 - tie estas zumado, 18 - injektas venenon, 19 - meza parto de insekto

VERTIKALE

1 - jen la ovoĵ!, 2 - espereble ne en via kuirejo, 3 - per kiu insekto telespektas?, 5 - uzata por studi genetikon, 6 - nigraflavulo, 10 - iuj metas ovojn en sterko, 11 - laboremullo, 12 - ujo por flugiloj, 13 - nematura vivoformo, 15 - saltas kaj krikrias, 16 - eta mordulo



Atingis nin nur kelkaj reagoj post la apero de La Brita Esperantisto. Ĝis nun tiuj malmultaj tamen ĉiuj estas pozitivaj.

Ni memorigas vin, ke la nuna redaktada aranĝo estas nur provizora, kaj invitas al homoj, kiuj interesiĝus pri la redaktora rolo, esprimi sian kandidatecon al ian.carter@esperanto.org.uk aŭ tim.owen@esperanto.org.uk. Ne justas, ke ĉiam la samaj malmultnombraj volontuloj devas preni sur sin la taskojn por la ĝenerala bono.

Por la venonta nombro ni bonvenigus kontribuojn kaj aparte ĝojus ricevi:

- recenzon de la nove eldonita dua eldono de *La Danĝera Lingvo* (aŭ eĉ alia libro, kiu ĝis nun ne ricevis recenzon),
- mallongajn artikolojn pri via Esperanto-aventuroj, aparte kun bildoj,
- kontribuojn pri homoj kaj historio esperantistaj,
- humuraĵojn, inkluzive de bildstrioj.

PRI MURIEL SHACKLETON

De Jack Warren ni ricevis malĝojan novaĵon pri la tre afabla Muriel Shackleton, kiu malsaniĝis en Aŭgusto kaj enhospitaliĝis.

Muriel lastatempe transloĝiĝis al fleĝejo kaj alte taksas, ke ŝiaj amikoj ne forgesis ŝin dum ŝia malsano. Ŝi tre kontentas ricevi leterojn de homoj kun kiuj ŝi havas tiom da ĝojaj memoroj dum la jardekoj.

Ŝi loĝas nun ĉe Ryecroft House, Knowles Court Nursing Home, 2 Bridgeway, Knowles Lane, Bradford BD4 9SN, do sendu tien viajn kartojn kaj leterojn al Muriel, bonkora virino belrideta, fidela Esperantistino, kaj amiko de multaj dum la jaroj.